

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, advok., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

N-o 179  
17. 2. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Biffin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto  
sufertis maksimume 50%; por ĉiuj alia,  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),  
ĉe „Internacia Komercio“ la duoblo

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Proceso kontraŭ esperantistoj en Rumanujo. La verda stelo intermiksita kun alia.

La 28 jan. antaŭ la militista tribunalo en Cluj (Transilvanio, Rumanio) okazis interesa pritraktado de proceso kontraŭ 28 junlaboristoj, inter kiuj pluraj esperantistoj, akuzitaj pri komunismo.

En la jaro 1922 la junlaborista organizaĵo en Cluj aranĝis kulturajn prelegojn kaj kursojn, inter kiuj ankaŭ tiun de la lingvo Esp. La partoprenantojn baldaŭ oni arestis, kulpigis ilin pri komunismo, la verdstelan insignon deŝiris, esp-ajojn konfiskis, kaj tenis ilin dum 5 monatoj en malliberejo. Post la esplorado oni liberigis ilin, sed la proceso daŭris ĝis nun.

La ĉefa kaŭzo de la persekuto estis eraro de policanoj, kredantaj, ke la verda stelo, ĉar kvinpinta, estas komunista insigno.

Kvankam sur la kulpolisto troviĝis nenio pri Esp., tamen la defendo citis antaŭ la juĝistaron kiel atestantojn ankaŭ s-ojn Andreo Ce kaj Tiberio Morariu, gvidantojn de la rumana Esp.-movado, el Bucuresti, por klarigi al la juĝejoj kaj polico, ke Esp. kaj komunismo ne estas la samaj aferoj. Sed tio montrigis nenecesa, ĉar la inteligenta kaj bonvola prezidanto de la juĝistaro, s-o Kolonelo Tucas, en la ĉeesto de la cititaj esp-istoj, mem faris la jenan deklaron: „Pro la kursoj de Esp. ne estis farata kulpigo, ĉar lerni Esp. estas ja eĉ laŭdinda afero. Mi deziras, ke ĉiu homo lernu tiun ĉi lingvon, kaj ankaŭ mi mem volonte lernus ĝin, se mi havus sufiĉan tempon, ĉar Esp. estas ne nur utila afero, sed ankaŭ tre bela kulturmovado, por interproksimigi la homojn. Sed se iu uzas tiun lingvon por celoj malpermesitaj, kaj se troviĝas pruviloj, tiam oni punas lin same kiel pro krimoj faritaj per alia lingvo.“

Ĉar seriozaj pruvoj pri la kulpeco de la senkulpe persekutitaj kaj suferintaj junuloj mankis, la juĝistaro absolvigis ilin.

La inteligentaj vortoj de la prezidanto saĝe kontraŭdiras la ridindan kaj stultan opinion de bedaŭrinde sufiĉe multaj obskuruloj, ne kapablaj trovi la diferencojn inter la lingvo kiel neŭtrala interkomprenilo, kaj iuj movadoj, por kiuj oni povas uzi tiun ĉi lingvon.

E. C. R.

## Esperanto en angla kvakera lernejo.

Dimanĉon, 6 januaro, okazis en Great Ayton (Anglujo) la jara konferenco de la kvakera gildo de instruistoj.

Ĉe tiu konferenco nia eminenta s-ano Prof. Collinson el Liverpoola Universitato parolis pri „Internacia lingvo kaj edukado“ kaj pri „La edukada valoro de Esp. en geografio kaj historio“. Kiel rezulto de tiu efikoplena propaganda laboro oni jam povas raportiri pri unua sukceso.

Senkelt School enkondukis Esp. lastan sabaton. Kursoj komenciĝis en la 2. kaj 4. klasoj. Instruistoj s-o Erick Mawson.

J. D. A.

## Ĝenerala kunveno de Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio (centro Pizen)

okazos 24an de februaro en laborista domo „Peklo“ (kafejo) je 9. horo matene. Skribajn proponojn oni povas ankoraŭ enmanigi antaŭ ĝenerala kunveno al sekretario. La agado estos sole per esp. lingvo krom respondoj je demandoj de reprezentantoj neesperantistaj:

Estas necese, ke ĉiuj estu kiel eble plej frue sur sia loko. **Gesamidanoj**, ni pruvu, ke laboristaro bone komprenas la signifon de Esperanto.

Por la estraro: Büchel.

## XII Germana Esperanto-Kongreso en Plauen (Vogtlando)

Centralhalle, Pentekosto 1924 (7.-10. de junio).

Sesa komuniko.

Ĉu vi jam aliĝis?? Oni nepre vizitu la XII-an germanan kongreson, kiu donos al ni gravajn taskojn, sed kiu ankaŭ unuigas la esperantistaron en urbo kun bela naturo en fute apuda proksimeco! Vi uzu la okazon, konatiĝi la tiel-nomatan „Vogtlandan Svisujon“ kun siaj arbaroj, valoj, montoj kaj pontoj. Kia tempo taŭgas pli bone el Pentekosto por kongresvojaĝo?

Aliĝo povas okazi per aliĝilo aŭ letere al la adreso de la subskribinto. Ankaŭ tiujn, kiuj ne povas viziti la kongreson aŭ kiuj ne ankoraŭ povas certe decidiĝi, ni petas, ke ili aliĝu malgraŭ tio! Ili tiamaniere ankaŭ helpas la Esperanto-movadon.

Kotizo estas Mk. 3.—, por edzinoj kaj infanoj po Mk. 1,50. Eksterlandanoj pagas la saman kotizon. Estas rekomendinde, ke oni aliĝu tuj, ĉar depost la 31 marto la kotizo plialtiĝos je Mk. 1.—; do ĝi estos poste Mk. 4.—. Krome vi per baldaŭ aliĝo plifaciligas la kongresajn antaŭlaborojn!

Monsendojn oni direktu al la subskribinto aŭ al Vogtländische Bank, Plauen (Poŝteka konto Leipzig n-o 398). Sed oni samtempe informu la bankon sur la transpagila kupono ke la mono estas uzota por la Esperanto-kongreso.

Kvitancarkarto. Ĉar ni havas plurajn kolektejojn por aliĝoj ni petas, ke oni sciigu nin, 3 semajnojn post la pago ne ricevinte kvitancarkarton. Nur ĝi rajtigas akcepti la kongresanojn en la akceptejoj!

Loĝejoj. Parto de la aliĝintoj aliĝis jam antaŭ 1 1/2 jaroj; plur aparto volis ankoraŭ informi nin koncerne la loĝejon. Pro la fiurilata neklareco ni decidis, prizorgi loĝejon nur por tiuj, kiuj de nun sciigos nin, por kiuj noktoj ili certe deziras litojn, kaj ĉu ili deziras loĝejon en hotelo aŭ privatan ĉe familio. Ni penos atingi plej eble grandan malmultekostecon!

Fakkunsidoj. La tempojn por la okazigo oni vidu el la programo ĉi-sekve publikigata. Denove ni petas, ke oni informu nin pro dezirataj fakkunsidoj plej eble baldaŭ.

Aliĝu ĉiuj kaj venu!

Hermann Scheider,  
Plauen (Vogtl.), Morgenbergstr. 47.

## Programo de la Plauen Kongreso.

7. 6. vespere je la 8. Interkonatiĝa vespero.
8. 6. matene je la 1/2 9. Kunsido de la G. E. A. — Konsilantaro. Samtempe sed nur se speciale dezirite — fakkunsidoj preparaj. Je la 1/2 11. Solena malfermo de la kongreso. Je la 1. Komuna tagmanĝo (ne festbankedo). posttagm. je la 3. la Ĝenerala Laborkunsido de G. E. A. vespere je la 8. „Vespere en Esperantujo“. (Seriozaj kaj serenaj prezentaĵoj de geeminentuloj el Esperantujo.)
9. 6. matene je la 9. Fakkunsidoj. 12.—1/2 2. Tagmanĝo. posttagm. je la 2. Ila Ĝenerala Laborkunsido de G. E. A. Poste oficiala malferma kunsido. vespere je la 8. Gaja vespero kun balo.
10. 6. dumtage Ekskursoj en la proksimaĵoj kaj pli malproksimaj ĉirkaŭaĵoj, gvidadoj tra la urbo; vizito de vidindaĵoj.

## Hungara Esperantista Societo Laborista.

La Hungarlanda Esperantista Societo Laborista reorganizis sian tutan societatan administradon. La asocio prosperas vigle kaj sukcese. Ĝian prosperon eĉ ne malhelpas la malpermeso, kiun la hungara ministro por internaj aferoj eldonis koncerne la oficialan SAT gazeton „Sennacia Revuo“. La socialistoj obeas nur pro la perforto kaj antaŭ la inteligenta homaro protestas kontraŭ ĉi tiu sufoko de libera penso kaj individua rajto, kaj samtempe esprimas la esperon, ke venos registaro tute tolerema.

La asocio eldonis vortaron „esperantan-hungaran“, kiu jam aperis kaj laŭ la aperintaj fakterminaroj enhavas ankaŭ la ĝisnunajn esperantajn fakterminojn. La vortaro kostas 4.55 h. kr. X la ŝlosilnombro. Oni ĝin menu de la „Eldona fakto“, VII, Dohany u. 71, I.

Por festi la 10-jaran datrevenon de la asocia fondo, la ĉi-jara ĝenerala jarkunsido — kies dato ankoraŭ ne estas fiksita — estos festkuteime dekoraciata.

Por instrui la lingvon inter la hungarlandaj laboristoj, la asocio havas porinstruantajn, progresantajn kaj komencantajn kursojn por kiuj la ejojn plej parte donas la diversaj sindikatoj laboristaj.

Por respondi je kiu ajn demando la asocio estas al ĉies dispono. — Adreso: Hungara Esp. Societo Laborista, Budapeŝt VII, Dohány utca 71, I.

## Praktika uzo de Esp.

Laŭ la lasta kajero de la „Naturescienca Revuo“ oficiala organo de la Hungara Reĝa Naturescienca Asocio, tiu ĉi asocio estas hodiaŭ la plej granda naturescienca societo de la mondo. Kompreneble — kaj tio estas nur mia opinio — nur laŭ membrolisto kaj kartoteko. La sekretariejo permesis kun granda ĝojo — laŭ mia persona peto — ke tradukoj el la revuo aperu en la esp. presaro, ĉe malgrandaj eĉ sen cito de la fonto. La revuo ankaŭ alprenos taŭgajn tradukojn el Esperanto kun fontoindiko. Pli granda sukceso ĉe tia speciale nacilingva societo ne estas ankoraŭ imagebla.

Jozefo Major, Budapeŝt.

## Ankoraŭ unu opinio pri Esperanto.

Rilate la kulturen rolon de Esperanto bulgara poeto Nik. Vas. Rakiĉin en Pleven skribis al s-o Iv. H. Krestanoff en Dresden, aŭtoro de pluraj geografiaj verkoj pri Bulgarujo, en Esperanto:

„Mi scias, ke la tasko de tiu ĉi lingvo estas pli granda, ĝi estas komunhoma, sed ĉu ne per la apartaj popoloj, donante la eblecon al ĉiu disvolvi siajn spiritajn fortojn kaj doni siajn trezorojn, estas atingota la komunhoma idealo? Ju pli la ligiloj inter la popoloj, eĉ inter la plej malproksimaj dank' al la eksterordinara disvolvigo kaj perfektigo de la komunikoj, fariĝas pli proksimaj kaj pli intimaj, des pli la bezono de internacia lingvo, de Esperanto, fariĝas pli necesa.“

Kaj mi kredas pri la estonteco de Esp., pri ĝia universala disvastigo, kiel mi kredas pri la kulturo, kies frukto estas tiu ĉi lingvo, kiu liberigas la homon de la besteco kaj, malgraŭ neantaŭviditaj zigzagoj kaj neatenditaj faloj, lin kondukas per la internacia solidareco al libereco, frateco kaj paco.“



# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sceligojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat. aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

## Ameriko.

### Usono.

**Boston.** La naskotagvon de Zamenhof festis la Bostona Esperanta Societo per kunveno. D-o D. O. S. Lowell, eksa ano de L. K. laŭlegis el la Vivo de Zamenhof kaj de Privat kaj rakontis proprajn rememorojn pri D-o Zamenhof. Monkolekton por la Zamenhofa monumento estis aranĝita.

La 29 dec. okazis Barĉo. La invitiita Field and Forest Club (Kampa kaj Arbara Klubo) ĉestis.

La 15 jan. finiĝis tri klasoj, de komencantoj, aligradaj lernantoj, kaj klaso de interparolado. L.L.

### Azio.

### Ĥinujo.

**Pekin.** S-o Kun-San skribas, ke oni havas bonajn perspektivojn por Esp. movado en Ĥinujo. En oktobro ni f. nulis Pekinan Esperanton Kolegion, en kiu estas pli ol 150 studentoj. En la programo estas: Esperanto, aritmetiko, kemio, legiko, filozofio, mond-literaturo, fontetiko ktp.

Laŭ letero de s-o Kun-San al s-o Hajan-Firoe (mongoliano) en Moskva.

## Eŭropo.

### Aŭstrio.

**Grossarl (Salzburg).** En tiu ĉi alpvilaĝo kontraŭ la mondama kuraloko „Gastein“ ok oficistoj kaj ankaŭ geinstruistoj fervore vizitas kurson. Gvidanto Karla Schmal, instruisto.

### Bulgarujo.

**Nova-Zagora.** Dank' al la klopodoj de niaj junaj kaj fervoraj s-anoj Ivan D. Lafceŭ kaj Anton Genov je la 15 jan. estas fondita Esp. grupo „Edmont Privat“ kun 50 membroj. Ankaŭ estis malfermitaj du kursoj, unu por lernantoj, alia por geurbanoj, ambaŭ kursoj vigle antaŭenpaŝas. La adreso de l' grupo estas Ivan D. Lafceŭ, str. Asparuh 6.

### Francujo.

**Perpignan.** Esperanta virina sekcio ĵus starigis. S-inoj kaj f-inoj Pélissier, Franc, Sola, Clos, Fourquet, Porta estis nomitaj komitatinoj. Adreso de la sekcio: s-ino Franc, „Ruche du Midi“, Rue Lucia, Perpignan.

### Germanujo.

**Köln.** La donacaranĝo okazis dimanĉon, la 27 jan. Dudek infanoj zorge elektitaj venis kun siaj geparencoj por akcepti la donacojn de la esp-istoj dediĉitajn.

Dum prezentejo kristnaskaj de infanoj Esperanto-kursoj ili ricevis ĵason da kakao kaj kukufajoj. La donacoj pakajoj enhavis po pli ol 10 kg da nutraĵoj: Corned beef, rizoj, pizojn, fabojn, farunon, kakaon, lakton kaj grason.

Krom tio ĉiu infano ricevis ion el la vestaĵoj senditaj. La ĝojo de la gemalgranduloj kaj de ties geparencoj estis kortuŝa, ĉar la plejmulto tute ne ricevis je kristnasko iun donacon pro la hejma mizero. Unu el la ĉe-estantaj parencoj dankis per simplaj vortoj al la donacintoj, al kiuj ni per tio transdonas ankaŭ nian dankon.

### Esperanto Gruparo Berlino.

La 15 januaro okazis la ĝenerala kunveno. La nun-jara estraro estas: 1. prez. s-o direktoro Gilck, 2. prez. s-o Busch, la sektr. f-ino Nickel, 3. sektr. s-o Lewe, kaseisto s-o Schwarzschild. — Februaro kunveno 19. 2. en kafejo Josty 1. etaĝo, je la 8. Paroloj s-o referendaro Stolpe kaj s-o Blankenheim pri UEA. — Diversaj gruparanoj aŭskultis la radio-paroladon de s-o Pitlik Prag la

31 januaro. La angla parolado ne estis aŭdebla. Berlinaj tag-gazetoj nun ofte raportas pri radio kaj Esperanto. La revuo „Radio“ havis en la januara numero longan raporton pri Esperanto kaj Radio, verkita de s-o Schwaiger, laŭ peto de la redakcio. H. N.

### Esperanto Grupo Potsdam.

En la jar-kunveno la 24 januaro oni reelektis la ĝis-nunan estraron: Prez. s-o instruisto Markau, Vpr. s-o rektoro Helmholz, sektr. s-o Pridat, Kasistino s-ino Schöne-mann, Biblioteko: f-ino Nickel. La grupo nun ricevis novan organizon: Krom la malnova jam de post 15 jaroj ekzistanta grupo formiĝis unuigo de Potsdamaj Esp. geinstruistoj (estro s-o Dietz) kaj Esp. junulara grupo. Oni intencas verbi interesoŭn kiel „Esperanto amiko“. (Ĉiuj kvar grupoj formiĝas la „Potsdaman Esperanto-Unuigo“). Kurso en popola elirnejo en nuna duonjaro bedaŭrinde ne povis okazi pro tro malmulte da partoprenantoj.

Por la diligenta esp. gelnaranto el 4 Potsdamoj popolernejo la grupo per helpo de en-kaj eksterlandaj monsubtenoj intencas aranĝi por ĉ. 80 infanoj festivesperon. La festeno okazos la 15 marto en restoracio Reichsgraf von Hoditz, Hoditzstr. Afablajn pliajn donacojn volonte akceptas s-o instruisto E. Markau, Potsdam, Hessestr. 3. H. N.

**Jüterbog.** En la popola alirnejo la direktoro de la Schiller-gimnazio instruas Esp. al 60 partoprenantoj. H. N.

**Dresden.** La G.E.A. loka unuigo Dresden unuigis la 30 jan. grandan parton de siaj anoj en la feste ornamita, malnova urba magistrata salono por ĝoigi sian honoran membron s-inon Hankel okaze de ŝia 80 naskiĝ-tago. Sub la sonoj de la pilgrima horkanto el „Tannhäuser“ de Wagner ludita de kvarteto da blovinstrumentoj, la jubileumino estis enkondukata en la salondon dum la multaj ĉesantoj salutis ŝin per solena levigo. Post horala ludo s-ano Johannes Karsch gratulis s-inon Hankel per vermaj paroloj je ŝia 80. naskiĝtago kaj donis detalan bildon pri la privata kaj speciale la esp. vivo de la jubileumino. La priskribo de la esperanta vivo de s-ino Hankel estis ilustrata per kanto „Esperantujo“ (f-ino Hildegard Nickel, Potsdam) kun fortepiana akompano de s-o Brügge-mann) kaj per deklamoj de poemoj el la „sebleroj“ (f-ino Knappe, Wild, Schindler, s-ino Krestenoff), komuna kantado de la Esp.-himno finiĝis la unuan parton de la kunveno. Poste s-o Engst gratulis nome de la Loka Unuigo, D-o Heinrich Arnold nome de G.E.A., samtempo sciigante, ke tiu ĉi asocio decidis nomi s-inon Hankel „honoramembro“. Post kelkaj prezentaĵoj kaj paroladoj de div. reprezentantoj finiĝis la festivespero. Joh. Karsch.

## Hungarlando.

**Budapest.** La Hungarlanda Esp. Societo ĉiam klopodas interesi siajn membrojn. La 20 jan. oni aranĝis ne ĉiutagan prezentadon pri la „nekonataj fenomenoj“. En enkondukaj esperantlingvaj paroladoj s-o Szentgyörgyi parolis pri la scienco bazo de telepatiaj kaj hipnotaj fenomenoj, s-o Szász rakontis pri spertoj memviditaj kun fakiroj, s-o J. Mátyéfi laŭlegis la doktrinojn de spiritismo kaj por la hungaraj s-o Balkányi konigis Esperanton, kiu laŭ li ankaŭ estas por multaj „nekonata“ mistera lingvo, vere magiolo, la ŝlosilo por la tuta mondo. La plej interesa preskaŭ duhora parto estis eksperimentoj kaj magiaĵoj de hipnota majstro Leo. Precipe bone sukcesis la telepatiaj, sugestaj kaj pensdivergaj eksperimentoj. — Dum febr. la societo aranĝas en Budapeŝt prezentadon kun balo.

— La 25 jan. antaŭ 40 personoj legis univ. Prof. D-o Zoltano Páznány de Sziles interese priskribon pri la nova juda literaturo de polaj kaj litovaj judoj, Vicprezidantoj Nagy-Molnár kaj D-o Lóránd salutis en nomo de la societo la Prof. por la interesa, valora antaŭlegado en nia lingvo. P. B.

## Italujo.

La 31 jan. okazis ĉe la Regiona Instituto de Esp. por Lombardio (Milano, via Rossari 2), malfermo solena de triagrada kurso por instruistoj.

La urbestro por la publika instruado G. Uff. Stefano Conio parolis pri la disvastiĝo de nia movado, laŭdante

isto, al kiu koncerne al tio, kion li volas pentri, estis la manoj liberaj, pentris „Ideo de l' mondo“. Ĉi tio estis lia unua pentraĵo, kie per peniko kaj koloroj li elkantis himnon al la mondo. Li versis el la animo la gajon de estaĵo.

Nu, la amo de Michelangelo al la vivo kaj ĝia ĝuo en la mondo ne estis blinda, senkonscia. Ĉi tio ne estis gajo de senzorga birdo aŭ de sana bovido. Li vidis la tutan teruron, malcastecon kaj neniecon de l' vivo kaj de l' homoj ĉirkaŭ si. De ili li suferis, sub ili li ĝemis. Li deziris kunmeti mil vortojn, ŝtalaĵn vortojn, por fandi ilin sur la fajro de sia malafabla animo, kaj por poste per ili kiel per flamaĵ vipoj bati la senhontan kaj senhonoran brutaron de l' homoj ĉirkaŭ si.

Sed Michelangelo ne estas verkisto, kaj ne estas retoro, li ne estas genio de literoj kaj vortoj. La tuta potenco de lia genio faras al si vojon en la eksteran mondon tra liaj fingroj, tra l' peniko kaj ĉizilo. Michelangelo pentras sur la plafonoj de l' Kapelo la lorgan vicon de profetoj kaj profetinoj, kaj apud profetoj en anguloj de l' plafono en malvastaj rondoj de l' pentraĵoj dudek junajn, sanajn korpojn premitajn kaj kurbigitajn. Li nomis ilin „sklavoj“. Ĉi tiuj liaj „profetoj“ kaj „sklavoj“ estas senespera krio de lia granda animo, kiun incitas frenezeco de l' vivo kaj malriĉeco de animo de l' homaro.

— Malgrandegaj, nulegaj hometoj, diras Michelangelo al ĉiuj sklavoj kaj profetoj. La naturo donis al vi forton kaj potencon, por iri en la mondon kiel kreaĵoj de libera kaj gaja vivo plena de animo, kaj vi, mizera sklavo rampas sur tero kiel la vermoj, entreniĝas kiel talpo en la mallumajn kaj malbonodorajn malvastlokojn de l' vivo.

La evangelio ofte parolas pri sklavoj. Parolante prie ili, ĝi nomas ilin ĉiam mallaboremaj kaj ruzaj sklavoj. Mallaboreco kaj ruzeco estas fundamentaj sklavaj ecoj. La naturo estas al ili jam tiel malbonigita. Sklavo estas mallaborema, kaj se la homoj kaj la vivo komencas kulpigi kaj mallaŭdi lin pro lia malhonora mallaboreco, li tiam, por pravigi sin kaj sian mal-

laboreman tutmondan samideanaron kaj dirante, ke la Komunumo Milano ĉiam apogus nian aferon. S-ano Johano Mainardi gvidas la kurson.

## Nederlando.

### Centra Esperanto Liberejo.

En la jara ĝenerala kunveno de akciuoj de la Anonima Societo „Centra Esperanto Liberejo“ en s-Gravenhage (Nederlando) la bilanco, la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobitaj kaj la dividendo fiksita je 6/10 (antaŭan jaron 5 1/2 %). Kiel komisaroj estis reelektita s-o D-o H. C. Mees en s-Gravenhage.

## Polujo.

**Katowice.** La 21 jan. kunvenis en la granda konferenco de la ŝtata fervojo direkto 72 fervojoĉiftoj por partopreni la malfermtan kurson esperantan. Antaŭ la malfermo de la kurso paroladis esp.-lingve s-o direktoro Reszka pri la neceseco kaj signifo de interzacia komuna lingvo por la trafiko. — Kursgvidanto s-o Ruszka.

Ĉe la dua leciono aliĝis pliaj 25 oficistoj.

## Rumanujo.

**Targul-Mures (Transilvanio).** S-o Francisko Rado, instruisto, la 12 jan. malfermis kurson por 37 gelnantoj 8-10-jara.

**Tighina (Besarabio).** S-ano I. Bauch gvidas kurson por 3 personoj.

**Turnu-Severin.** S-o Michaelo Dudas, del. de UEA en Orsova, faris tie ĉi viziton la 20 jan. por prepari kurson kaj grupon.

## Rusujo.

**Moskva.** 10. 1. 24 s-o M. Valentinov faris raporton pri Esp. dum kunsido de la komitato de Tutruslanda Unuigo de Poetoj La komitato decidis aranĝi Esp. kursojn por anoj de la Unuigo.

**Kazanj.** (Raporto pri la agado de la Kazana Esp. Societo de 1. 12. 1923 ĝis 15. 1. 1924.) Okazis du lekcionoj pri Esp.; per lekcionoj „Esperantismo en kondiĉoj de la evoluo de internacia socialismo“ la societo solenis la memoron de D-o Zemenhof 15. 12. Dum la lekcionoj estis aranĝita ekspozicio de esp. literaturo. — Malfermiĝis nova kurso en popola komisarieroj de provizado. — La 25. 12. fondiĝis ĉe la societo rondeto de SAT. — La 31. 12. la Kazanaj esp-istoj aŭskultis la tre klare aŭdeblan radiotelefonan raporton esperantlingvan el Moskva (distanco 800 km). — En la Kazana tataro kaj rusa gazetaro dum la indikita tempo estis lokigitaj dek notoj kaj artikoloj pri Esp. En tataro monata ĵurnalo „Tatara Ĵunularo“ estas presita lernolibro de Esp. por tataroj (en ĉiunonataĵ daŭrigoj). Grandformata dekdufolia markulardano komerc-reklama por la jaro 1924 multe disvastigita en Tataro respubliko, konatigas kun Esp. per granda artikolo pri la signifo de Esp., mallonga gramatiko, sufiksaro kaj kelkaj lecionoj. — Por pliperfektiĝon en Esp. multaj Kazanaj esp-istoj partoprenas kunlaboradon en plej gravaj esp. gazetoj kaj ĵurnaloj. H. Frank.

## Kulturo.

La homa racio kaj antaŭ ĉio la reala neceseco instigas la ĝeneralan enkondukon de praktikaj iloj aplikataj en la tuta kulturo-mondo. Ni esperantistoj ja konas la malfacilaĵojn de la multlingveco forigebla per uzo de facila helpilingvo apud la gepatra idiomu. Same konataj estas la malfacilaĵoj kiuj rezultas el la diverseco de la monspecoj, horaristemoj, fervojo-signaloj, trafik-regularoj, poŝtmandata pagaranĝoj ktp. Speciale grandaj estas la malhelpoj de la sistemoj de mezuro kaj pezo. Evidenta kultur-progreso estas la unueco de la diversaj sistemoj. Pli kaj pli estas enkondukata por mezurado la metrosistemo.

laborecon, kulpigas ĉiujn kaj ĉion, ruze eliras sin.

Tiamaniere ankaŭ agis la „sklavoj“ de Firenze, samtempulo de Michelangelo. Ili ĉiamaniere pretekstis malpotencon kaj mizeron de l' naturo de l' homaro. Ili parolis al profeto-artisto.

— Jes, vero estas, ke ni senhoroj kondutas. Nia patrujo sangas. La malkleraj tiranoj disĉifas kaj hontigas memfandan kaj belegan Firenze. Kaj ni „ĝojegas dum tempo de l' pesto“. Super patrujo Firenze buliĝas densaj nuboj, kaj ĝiaj filioj mallaboremaj kaj ĝojas kiel dum tagoj de l' edziĝfesto. Ĉe estas malboniĝo. Ĉiuj estas venditaj. Sed, kion fari? Malamiko estas potenco, kaj niaj fortoj estas malpotencaj. Kiamaniere ni povas batali?

— Kiamaniere? Ekflamis kun nova flamo de malafableco la genia suferanto. Vi diras, ke vi estas malpotenca, kaj ke la malbono, kiu vin sufokas, estas granda kaj intensa? Vi ne estas potencaj por kontraŭbatali ĝin?

Kaj kiu eliris al batalado kontraŭ Goliato, al tiu miraklo laŭ kresko kaj forto, kiam li incitegis la hebreojn? Ĉu iu grandulo al li simila? Aŭ ĉu ankoraŭ pli forta heroo? Eliris knabo 14-jara, Davido, kun du ŝtonetoj en la dorsosako, kun bastono kaj jeŝilo en la mano. Kiam Goliato vidis ĉi tian kontraŭulon, li tuĝ ofendite ekris:

— Kio, ĉi iras kontraŭ mi kun bastono, kiel kontraŭ hundo? Je ĉi tio Davido respondis al Goliato: Ci krias. Ci fidas al cia giganta kresko, al cia forto de bovo, al cia akra glavo kaj cia peza lanco, kaj mi ekiris je l' nomo de Dio kaj mia popolo.

Konate estas, kiel finiĝis la batalado de Davido kun Goliato. Falis tuta monto, falis Goliato, antaŭ neforta infano je potenco animo.

Michelangelo vere admonas per ĉi tiu ekzemplo la malgrandanimajn homojn, ruĝajn sklavojn, kiuj pro sia ŝajna malforeco eltenigas el la batalo kun la malbono. Li skulptis el ŝtono Davidon, grandegan, tre grandigitan, du aŭ tri foje pli grandan ol estas la kresko de homoj, por ke ĝi estu videbla jam pro sia grandeco. Tiun ĉi statuon li starigis sur plej vivantan placon.

## La optimisto-suferanto.

De Grigorij Petrov.

Prenos mi unu optimiston, sed la artisto-optimiston, la genion de Firenze, Michelangelon.

Li mem en sia vivo — interna kaj ekstera — estis la granda suferanto. Li vivis 83 jarojn, kaj ĉi tiu tuta tempo de lia vivo estis tempo de suferado. Michelangelo komencis suferi ankoraŭ en la ventro de l' patrino, pli frue ol li naskiĝis. Dum la lastaj monatoj de sia gravedo falis lia patrino de ĉevalo kaj longe ĝi trenis sin sur tero. Li naskiĝis kun nenormala, neproporcia korpo. Kiam Michelo estis 14-jara, lia kulernanto Torriciani frapis lin pro envio per pugno en la vizaĝon kaj rompis lian nazon. La arta genio, pasia amanto de l' beleco — Michelangelo estis ĉio escepte bela. Ĝis profunda maljuneco li ne konis la feliĉon de reciproka amo. Lia animo ne estis lumigita kaj varmigita per la ĉarmo kaj amindeco de l' virino, kiun li amis.

Kiel entuziasma kaj sincera patrioto, kiu tro amis sian Firenze, Michelangelo ekvidis ĝian falon, vidis, kiel oni rabas kaj sklaviĝas, kaj — kio estas plej malbona, Michelangelo devis rigardi, kiel la cetera loĝantaro de Firenze, forgesinte la malhonoran kaj sklavadon de sia urbo, facilpensante, malhonore amuziĝas, ĝojas kaj festediĝas.

Fine kiel artisto genia Michelangelo ĝis la fino de l' vivo havis pro sia suferanta spirito malpli da ĝuado, sed pli da maldolĉo kaj seniluziĝo. Lia kapo estis plena je grandaj pensoj kaj planoj, sed homoj kaj okazoj malhelpis. Jen oni trenis lin al laboroj, kiuj al la artisto estis malagrablaj, jen oni ne donis al li eblecon, por ke li realigu, kion li ekpensis.

Michelangelo kiel homo, kiel urbano kaj kiel artisto suferis multe dum sia tuta vivo. Tamen li ne malbenis la vivon. Li ne rigardis ĝin kiel malbonon.

Kiam Michelangelon-skulptiston, genion de l' marmoro, papo Julio preskaŭ perforte devigis, ke li prenu en la manojn la penikon de pentristoj kaj ke li pentru la plafonon de l' Kapelo de Siksto, tiam pro la tiraneco ĝis ekscitego ekscifita la art-



Rimarkindaj kaj laŭdindaj estas la modelaj paŝoj, kiujn tiurilate entreprenis ĵus la nova persa registaro. Nia persa korespondanto Prncino Bahmen Sidani en Teheran raportas al ni en letero de l' komenco de januaro nunjara pri tio laŭjense:

**Enkonduko de metro-sistemo en Persujo.**

La ministraro en kunsido de ĵaŭdo 13 dec. 1923 decidis devigan uzadon de metrosistemo en tuta lando. Jen kelkaj artikoloj de oficiala leĝo:

1. La oficiala persa pezo, longo, enhavo estas laŭ metra sistemo, bazita sur metro, gramo kaj litro; kaj la nomo de unuoj estas:

- 1 zar = 1 metro
- 1 dram = 1 gramo
- 1 raitl = 1 litro ktp.

8. Tiam, kiam en unu loko de lando la novaj mezuriloj estas sufiĉe preparitaj de registaro, kaj la urba konsilantaro anoncas, post unu monato en malgrandaj urboj kaj post tri monatoj en provincoj la uzado estos deviga.

9. Post la supraj datoj uzado de malnovaj mezuriloj estas tute malpermesita.

Bahmen Sidani.

**Scienco.**

**Nova apliko de hipnotismo**

Antaŭ nelonge en ginekologia universitata kliniko en Petrograd (nun Leningrad) Prof. Skrobanski faris operacion, uzante hipnoton anstataŭ narkotilo. La operacio, daŭrinta 1/2 horon, plensukcesis. La pacientino la tutan tempon ne nur obeis la volon de l' hipnotiginto sed ankaŭ respondis ĉiujn demandojn. La hipnoto sentigis al ŝi neniajn dolorojn.

R. Z-on.

**Operacioj kaj akuŝoj pere de hipnoto.**

La 6 januaro en la kunsido de la hipnota sekcio de psika-neŭroza konferenco okazis interes-plena raporto de konata Harkova Prof. Platonov pri apliko de l' hipnoto ĉe akuŝoj por sendolorigi ilin. Li raportis pri multaj kazoj, kiam sub influo de l' hipnoto akuŝantinoj sentis nenian doloron. La hipnoto estas jam aplikita grand-sukcese ĉe tre komplikaj operacioj. De virino oni forigis pere de hipnoto la ŝvelojn de mamo, kaj operacia virino frankvile observis la procedon de la operacio sentante nenian doloron. Antaŭ nur unu monato estis farita operacio de apendicito pere de hipnoto. Ĉe unu malsanulo estis forigitaj 6 dentoj. La hipnoto, laŭ diroj de la raportinto, estas tute ne malsaniga kaj devas forigi la aplikon de narkoto.

M. Smirnov, Kazan.

**Por la „Kroniko“  
uzu telegram-stilon !!**

tiel ke ĉiu devas preskaŭ iri sur ĝin. Por ke ĝi haltigu ĉion kaj de tago al tago krii al la loĝantaro de Firenze, de frua mateno ĝis malklara mallumo:

— La bono kaj justeco estas nevenkeblaj: ne ekzistas ĉi tiuj grandaj Goliatoj, kiuj estus pli potencaj ol ili, se vi mem nelasos viajn poziciojn kaj ne donos ilin sen batalo al la malbono kaj mensogo.

Nu, por triumfo de l' bono, por levigo de l' homara vivo sur la altecon de brila festo, ankoraŭ ne estas sufiĉe, ke ni batalu kun la malbono, kaj ke ni venku. Ĉi tio estas nur la duono de la laboro kaj la duono de pli malgranda karaktero.

En la vivo regis la malbono. Tie ĝi varmigis kaj fajrigis. Venkita ĝi estas, kaj plu ĝi ne ekzistas. Sed tio neniel sufiĉas. Nun venas la vico, semi kaj planti bonon, justecon, amon, gaĵon, belon. Bezona estas suferanta laboro. La ordigo de luma kaj por ĉio gaja vivo. Fariĝas la granda tasko, elveki en la homoj la dormigitajn lumajn fortojn kaj sentojn. Michelangelo faras ankaŭ ĉi tion.

Post malvenkaj kaj ekstremantaj pentraĵoj de profetoj kaj sklavoj, post grandega statuo de Davido, Michelangelo komencas sian plej grandan faradon. El marmoro li skulptas „Mozeon“ — statuan, al kiu laŭ genio ne estis kaj ne ekzistas io egala sur tero.

Oni devis pli frue okdek jarojn toleri kaj suferi por krei ĉi tian faradon. Kaj ja valoras al homo naskiĝi, vivi kaj suferi, sole por vidi ĉi tiun kreacion de l' homa genio.

Ŝtato „Mozeo“ estas en Roma. Ĝi estas starigita en templo de Sankta Petro, sed ne en tiu templo de Petro, kiu estas konata al la tuta mondo, sed sur la alia flanko de Tiberio en la templo, nomita S. Pietro in Vincoli.

Kiam vi alpaŝas en la templon, antaŭ vi staras la plej genia inter la gvidantoj de popoloj, la leĝdoninto kaj profeto Mozeo. Antaŭ vi staras malvarma marmoro, kaj antaŭ ĝi vi falas en varm-

**Agrikulturo.**

**Nuntempa stato de rasa brutkulturo en Rusujo.**

En 42 gubernioj kaj en 3 aŭtonomaj regionoj de R. S. F. S. R. oni nun kalkulkas 502 rasojn brutkoloniojn, kies tuta areo egalas 608 149 desjajinojn (Desjajna — rusa fermezura unuo = 60x80 klaftoj) aŭ 1,0925 da hektaro. Rim. de tradukinto); el tiu areo 205 805 desjajinoj estas plugataj kaj 170 609 desjaj. estas konservataj kiel herbejoj kaj fojnprovizejoj. Plena kvanto de granda kornhava brutaro en ĉiuj ĉi kolonioj egalas 29970 da kapo el ili: bovoj — 809 kap., junaĝaj — 10788 kaj rasa bovinaro — 15 375. Rasa brutaro estas diversgata: Rusaj gentoj — 18, alilandaj — 11.

En ĉiuj ĉi kolonioj oni kalkulas 8614 kapojn da porkaro diversgata, el ili virporkoj 590, junaĝaj 3013 kaj porkinoj 5011.

Safaron oni kalkulas 95515 da kapo, el kiuj 60 034 da merinosoj.

Kompare kun la jaro 1922 la kvanto da brutaro kalkuline pligrandiĝis.

Naskitaro precipe pligrandiĝis ĉe porkaro.

Nombro de l' kolonioj, kompare kun 1922 ankaŭ pligrandiĝis je 138 (estis 366). Manko de speza kapitalo kaj fozesto de vendado multe embarasas la disvolviĝon de kulturado de rasa brutaro. Kiel stimula rimedo por disvolvigo de rasa brutkulturo estis aplikita (dum pasinta jaro) liberigo de brutkoloroj de ŝtataj kamparmastrumaj impostoj. Rasa brutaro estas en granda kvanto ricevita el eksterlando.

Vadim V. Obracov, Kazan, Rusujo.

**Diversaĵoj.**

**Konsumo de lakto en Germanujo.**

Kiom granda estas la mizero en Germanujo kaj kiom pereige ĝi efikas je la loĝantaro, precipe la malfeliĉa infanaro montras ekzemple la statistiko pri la konsumo de lakto: en nuntempo ĝi egalas al 1/10 de tiu en 1914, kiam ĉiu regnato havis meze po 1/2 litro ĉiutage!

**Libera tribuno.**

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj scigoj, informoj, kritikoj, liberalaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifizi neŝajnajn artikolojn.

257. Ril. 227 nekstas.

Kvankam ni jam fermis la diskutadon pri „neksta“ ni hodiaŭ enpresas interesindan respondon de perslingvano, kiu denove pravas la superflucon de tiu ĉi neologismo.

Uzado en Persa lingvo:

1. As-tempo: se oni parolas pri tago, semajno, mondo, jaro, oni diras: „mi skribos ĝin en morgaŭa numero“ aŭ venonta numero sed: mi vojaĝos en venonta semajno; tio signifas do ĝuste venonta semajno. Sed kiam oni skribas: ke „mi skribos ĝin en venontaj numeroj“ „morgaŭaj ne uzebla“ aŭ „mi vojaĝos en venontaj semajnoj“ tio signifas ne difinitan tempon venontan. Do la morgaŭa mateno, venonta tago, venonta numero, morgaŭa numero, venonta semajno aŭ jaro ktp. estas tute ĝustaj kaj difin-

itaj; sed por nedifinitaj oni uzas „venonta“, neniam oni uzas en as-tempoj la vorton „posta“.

La vorto „proksima“ ankaŭ havas nedifinitan sencan ekzemple: „en unu proksima numero“ aŭ „en proksimaj tagoj ktp.“

Is-tempoj:

„Li tiam ne scias, ke lia amiko alvenos la venontan tagon; estas ĝusta kaj prefera al „posta“ kaj „morgaŭa“. „Li tiam ne scias ke lia artikolo presigos en posta, aŭ“ venonta numero“.

„Li tiam ne scias, ke kie okazigos je posta tago“. „Li tiam ne scias, kion la morgaŭo alportos por li“.

Ĉiuj ĉi supraj frazoj estas ĝustaj kaj difinitaj. Sed se oni volas paroli pri ne difinitaj tago, numero ktp. oni uzas prefera „postaj“ kaj malmulte „venontaj“.

Do tiam, kiam oni volas esprimi nedifinitan tempon aŭ ajon oni ĉiam uzas la vorton en multinombro. Kaj la vorto „posta“ ne estas uzita por as-tempoj.

Mi ankaŭ ne opinias necesa la ŝarĝon per nova vorto. Kaj pri la frazo „La venontan tagon li volis forvojaĝi“ laŭ mia opinio estas ĝusta kaj klara, ĉar oni en pasinteco parolis pri estonteco, kaj „estis venonta“ estas ĝusta. La formo „estis“ estas necesa por esprimi ke ni parolas en estanteco pri pasinteco, kaj „venonta“ esprimas, ke alero okazigos en estonto de pasinto.

En la frazo „estos venonta“ la vorto „estos“ esprimas ke en estante ni parolas pri estonto kaj la vorto: „veninta“ esprimas ke en estonto la alero okazigos antaŭ kiam ni parolas nun pri ĝi.

Do la frazo estas ĝusta, kaj la vorto venonta, estas klara en estonto kaj estinto, sed vorto „posta“ nur estas klara en estinto. Ĉar mi studis mem kaj ne havis perfektan instruiston, eble mi ne bone komprenis la sintakson.

Bahmen Sidani, Teheran (Persujo).

258. Rilatas 256.

Estante Esperanto lingvo nenies propraĵo aperas strangege ke s-o Vimson povas negi ke s-o Wüster havis la rajton kompili k. e. doni „Oficiala Radikaro“n, multe pli ke la Akademio ne eĉ faris ian rezervon pri la Car'a ediciono (eldono). Sed tamen la plej elementa kriterio diras ke kiu aŭ estas libera fari kolekton de vortoj de tiu lingvo klasifikante ilin laŭ kiam ian metodon li preferas. Neniu (Neniu) povas ne agnoski (konstati) ke Wüster estis tre akurata kompilisto.

Cu do Esperanto devas esti eskluzivaĵo de l' Akademio, de s-o Cart aŭ nur de malnovuloj?

Estas konstanta (konst-tote) ke la Broŝuro de s-o Cart aspektas pli neoficiala ol tiu de Wüster. Krom esti nekompleta ĝi enhavas ne Fundamentan gramatikon eĉ ne kompleta); en ĝi mankas la signoj distingaj de la tri aldonoj; ĝi enhavas la neoficialan konsilion pri la negraveco de kursivpresitaj radikoj kies multo inverse estas tre grava; al ĝi mankas dokumentaj notoj kaj la manko de finaĵoj lasas sensignifajn kaj fial tutilberkarakterajn ĉiujn radikojn.

S-o Wüster tutekonscience agis ofrate (ĝuigante) la plej fidelen „Oficiala Radikaro“ kun karakteriloj.

Mi ne komprenas kion oni taksas Wüster'a lingvaĵo. Cu ke iu esperantisto ne povas prezenti la Esp-o-radikojn sub kia ian gramatika finaĵo li volas? Kial do la Akademio ne donis iun?

S-o Vimson ne volu timi la ombrojn k. ne ŝanĝi lempiron (?) anstataŭ lanternon. Ĉi-momento estas tro danĝera la opero en Esperanto de familia diskorde, multe pli ke la Fundamento kvank. bazata sur bon unuec-principoj enhavas neperfektaĵojn kaj diskutelaĵojn, kiuj facile povas krei skismojn.

G. Meazzini, L. K.

\*) Almena ĝis kiam la „Fundamenta Krestomatio“ ne estos oficialiga.

PS. Pri la kondamnoj de Estonaĵ Societoj mi diras ke ili ne rajtis. Tro da papoj (!? Red.) ekdifektas la kuiradon!

Rimarko de la redakcio:

Ni oĝale enpresas la respondon de s-o Prof. Meazzini originale kun ĉiuj lingvaj ŝanĝoj kaj eraroj pri akuzativo

econ. Ŝajnas al vi, ke el la okuloj de Mozeo venas fulmoj kaj ke ili vin bruligas.

Michelangelo prezentis Mozeon je tiu momento, kiam li venis de Sinajo, gvidinte la hebreojn el Egipto, liberiginte ilin de l' jugo faraona. La hebreoj estas en la dezerto. Inter ili kaj la lando de ilia sklavado estas — la maro. Ili estas liberaj.

Nu, ĉi tiu libereco estas ekstera. Fizika, korpa. Ne estas enkatentigitaj iliaj manoj kaj piedoj. Sed ilia animo estas en katenoj. Ili estas putrantaj kaj malbonigitaj anime; ili estas revenigitaj de l' epokoj de sklavado. Oni devas anime renaskigi ilin; aĵlernigi; traigi ilin per la nova spirito. Per spirito de libera, vola, gaja kaj enspirita servado al la komuna bono kaj justeco sur tero. La homoj, kiuj estas invitatitaj por esti profetoj, klinas al sklaveco. Ĉi tie popolo de sklavoj devas fariĝi popolo de profetoj, popolo de Mesio.

Mozeo kolektis sian popolon sur la piedestalo de Sinajo, kaj mem supreniris la pinton de l' monto, por ke soleca li trapensu pri vojoj de l' nova vivo, brila, gaja kaj libera. La pinto de l' monto estas ĉirkaŭita de nuboj. El ili fulmas. Tondras. Nu, Mozeo nek vidas, nek aŭdas ion. Li estas tute eniginta en sin mem. Kvardek tagoj kaj egale tiom da noktoj enestas kaj fosas Mozeo en la profundoj de sia cerbo, enprofundigas en kaŝitajn sekretajn vojojn de sia animo, aŭskultas la voĉon de Dio en si, kaj — komence en la pensoj kaj poste ankaŭ sur tabuloj skribas kaj franĉas vorton post vorto: la ordonon de l' nova, brila vivo.

Vojoj de ĉi tiu vivi estas malkovritaj al Mozeo. Li klare ilin vidas. Kaj plena de gajo, la vizaĝon brilanta kiel la suno, li venas de Sinajo al la popolo de estontaj profetoj. Kaj ĉi tiu popolo de la lasta servado, la besigita popolo, dum Mozeo estis sur la monto, fandas al si bavidon el oro — beston, kaj beste al ĝi servas.

Kiu homo iam ĝisvivis kaj povis ĝisvivi pli teruran seniluziigon de homoj, popolo, homaro! Mozeo konis ĉiujn senfundajn profundojn kaj abomenojn de l' falo de la hebreoj, kaj li tremas en plej malgranda vejneto pro malafableco, sed ne pro deziro por venĝo, ne pro malica kolero,

ne pro indigno. En la anguloj de l' okuloj, en la linioj, kiuj iras al la tempioj, Michelangelo entrancis al sia Mozeo sulkojn, en kiuj kaŝigas granda kunsufero, grandega transdonata amo al la popolo kaj plena de maldolcedo kaj doloro pro la malklara naturo de ĉi tiu nacio! Se vi rigardas Mozeon, ŝajnas, ke estas sur lia vizaĝoskribitaj la vortoj:

— Kion ci faras el ci, nacio mia, Izraelo elektita? Desinita estas ci, por doni al la mondo Mesion, kaj ci ruliĝas sub la ungo de flaco sen animo!

Se vi mallevas vian rigardon pli malalten sur la vizaĝo de Mozeo, vi vidas la forte premitajn dentojn kaj mallarĝigitajn lipojn. El ili vi sentas neŝanceleblan kredon en la homon kaj tutan certigon, ke fine tamen estos venkita la aĉo de l' homa naturo; vi sentas nerevokeblan decidon pri batalo kontraŭ ĉi tiu aĉo, ĝis la triumfo, kaj la certigon, ke el sklava nacio fariĝos nacio de l' profetoj, nacio de Mesio.

Vi ne povas deturni vian rigardon de ĉi tiuj premitaj dentoj kaj lipoj, kaj ekŝajnas al vi, ke post ili — kiel vaporo el tre varmiga kaldrono — kun muĝo eliras la vortoj:

— Egale, ke dum longaj jaroj sekiĝis kaj putriĝis la plej belaj floroj de nacia animo. Mi disigos montojn de l' malbonodora sterko, kiuj kolektiĝis sur la animo popola; kaj en la profundo de popola spirito, en ĝia krusto, mi trovas la oran glason, plenan de l' pura sanktumajo de Libanono. Kaj la sankta fumo-leviĝos ĝis la ĉielo, kiel afabla odoro de la plej bonaj paĝoj de l' homara animo.

Jen, ĉi tio estas homo, leĝdoninto, gvidanto de l' popolo Mozeo de Michelangelo, li ne reenczas la vivon kaj homojn laŭ videblaj faktoj. Li rigardas sur la fundamentojn de l' vivo, sur la fundon de l' homa animo. Li komprenas, ke kaj la homoj kaj la vivo donos al vi tion kaj tiam, kion kaj kiom vi volas kaj povos de ĝi preni. Aŭ pli bone: la vivo kiel frukta kampo riĉe fruktodonas al tiuj, kiuj sur ĝi semas.

Tradukis Fran Janjić, Vincovi.



Tio ne sole montru nian toleremon, sed pruvi ankaŭ, kio sekvas, se ĉiu enkondukus aŭ ŝanĝojn fundamentajn, aŭ proprajn preferaĵojn. Dume oni jam kritikis la „Wüster-afan“, la espresita respondo donas provon de jam evoluinta „Meazziniaĵo“. Por faciligi la komprenon al ne-latinidoj kaj ne-lingvistoj ni aldonis en la tradukon en Esperanto, Konsiderante, ke ĉiuj reformuloj havas personajn proponojn neniel akordigeblajn reciproke, ni antaŭvidas, ke post unu aŭ du jaroj de uzado oni devus aldoni tradukon en fundamenta Esperanto aŭ, kio tiam ŝalnos pli prudente, simple tradukon en nacia lingvo, ĉar la internacia lingvo tiam ja fariĝis suverflua. Tiam ni denove havos la haoson, kiun kontraŭbatali celas la internacia helplingvo. Tiam probable pro tio da teorio malebligos la praktiko kaj regos konfuzo, kiu etendiĝos kredoble ne sole super la lingva sfero. Eble la postskribo de s-o Prof. Meazzini estas provo.

Ankaŭ laŭ nia opinio Esperanto nur progresas per libera evoluo, sed kompetenta institucio ekskluzive devas kontroli, ordigi kaj registri la detalojn. Sole tio garantias unuecon kaj gardon de laŭsistemeco kaj lingva disciplino predikataj de reformemuloj kaj harspliligemuloj, sed neniam atentataj de ili mem. Ke ĉi tiu laboro ne jam estas farita en dezirinda amplekso aŭ ne povas esti farata de la Lingva Komitato kaj la Akademio esperantistaj, tio ja dependas, kiel estas konate, de plej diversaj kaŭzoj. Oni do forigu ilin, helpante kaj akcelante tiun ĉi laboron!

**Al niaj legantoj!**

Post plurmonata malhelpo niaj du kongreskestoj fine alvenis. Intertempe ni ekspedis jam ĉiujn postmenditajn kongres-numerojn de ET kaj menditajn librojn. Interesatoj pri la nomitaj numeroj tuj skribu al ni.

**Agentejo en Anglujo.**

Per faciligi al niaj fervoraj anglaj samideanoj la abonan de ET ni ĵus starigis agentejon, kies gvidado troviĝas en la mano de

s-o J. D. Applebaum, Mayville Road 11, Mossley Hill, Liverpool,

kiu de nun akceptas abonojn por ni. Transpagojn oni faru al London Joint City and Midland Bank, Allerton Ra. Branch, Liverpool for J. D. Applebaum a/c. Esp. Tr.

**Alvokoj.**

**Helpo al germanaj infanoj.**

Krom la jam nomitaj donacoj dume alvenis: IK Antwerpen 5 b. fr., l. l. Tidasolm 30 sv. kr. G. B. Alstone 10 S., R. O. Spezia 15 l. Esp. Sog. Zagreb 255 d. (?) L. O. London 1 dol. H. V., Y. C. Geit 10 b. fr., A. kaj l. v. G. Antwerpen 7 b. fr. F. U. Bürgstein nutraĵojn, L. O. London vestaĵoj, J. H. Olmüß 10 c. kr., l. V. Antwerpen 5 b. fr. T. W. Kattowitz 500 000 p. m., R. Zeist 6 fr.-fl. Krome multaj donacoj de la Köln'aj samideanoj. Al la gedonacintoj ni ree korege dankas kaj bedaŭras ke ili plejgrandparte ne povis mem vidi la ĝojon de la malriĉuloj. (Komp. raporton sub „Kroniko“).

R. C. Brakel, Prez. Aug. Junker, Del. de UEA.

**Festo de floroj en Locarno.**

Okaze de la Festo de Floroj okazanta en Locarno (Svisujo) je la 6. aprilo, la lokarnaj samideanoj intencas organizi sur ŝanĝ-aŭtomobilo florumitan veturilon kun esperanta simbolo.

Ĉiucele ili deziras ricevi el la tuta mondo ideojn aŭ proponojn pri la adoptebla subjekto.

La propono kiu estos elektata ricevos premion. Ĉiu proponanto ricevos detalan raporton pri la Festo de Floroj.

Proponantaj skribu al la Esperanta Grupo Locarno (Svislando).

**Kongresnumeroj de ET.**

Se vi ne jam posedas la kongres-numerojn de ET, mendu ilin tuj, antaŭ ol la provizo de niaj ĵus alvenintaj kongresĵoj elĉerpigis. Escepta prezo por la serio de 5 numeroj ĝisplue estas nur 30 sv. centimoj aŭ 1 ET-num. por abonantoj.

Skribu tuj al la Administraco de ET Horrem b. Köln, Germanujo.

**Ĉiu**

literatur-amanto, studento kaj speciale tiu, kiu interesiĝas pri geografo, kulimoj, moroj, popolo kaj lando de fremdaj nacioj nepre devas interesiĝi pri

**„Litova Almanako“**

eldonita de Litova Esp. Asocio en Kaunas. Sur 285 paĝoj tiu bonege kaj alloga aranĝita libro informas pri litova literaturo, penso kaj vivo per artikoloj de unuarangaj esperantistoj de Litovio.

Prezo nur 3,5 sv. fk.

Mendojn tuj al Eldonejo de Esperanto Triumfonta Horrem b. Köln.

**FOIRO DE BRESLAU**



9.—11. marto 1924.

La kvalito-merkato por orienta kaj sudorienta Eŭropo

Duona pasporta takso por eksterlandanoj. Alvojaĝo-formalaĵoj faciligitaj!

Informoj      Foir-legitimacioj      Katalogoj

**Messamt (Esp.-fako) Breslau**

Elisabethstr. 6

Elisabethstr. 6



**LEIPZIG-A FOIRO**

La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Fairoj por Tekniko kaj Konstrufako

Printempa Foiro 1924 de la 2<sup>a</sup> ĝis 8<sup>a</sup> de marto.  
Aŭtuna Foiro 1924 de la 31<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis 6<sup>a</sup> de septembro.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Fairoficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig:

**MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG**

Ni serĉas perfektan, diligentan

**Maŝinkompostiston je Linotipo (simpla)**

por la kompostado de ET kaj de germanlingva ĵurnalo. Kondiĉo: sufiĉa scipovo de Esperanto.

**T. & H. Jung, Horrem b. Köln**

**Anoncetoj.**

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĝiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ke ĉi tiu ni povas deprezi la pagon de la abonkoto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.—mk, prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-oj Mariö kaj Georgo Deŝkin (Moskva, Miasnicka 21, l. 15) naskiĝis la 27. 11. 23 filino, nomita Galinjo. [1]

NASKIĜO. Al geesp-istoj Antonino kaj Paŭlo Fedulov (Odessa, Rusujo) naskiĝis filino. Odessa Esp. St-o kore gratulas sian komitatanojn kaj lian edzinon. [1]

NASKIĜO. Al ges-oj Contarjii, est. del. de UEA en Caŝani-Not (Besarabio, Rumanio), nun loĝantaj en Argentino, naskiĝis filino, nomata Lia. (Niajn gratojn. Red.) [1]

FIANĈIĜO. S-o Voitech Tomas, inĝeniero kaj f-lino Mizzi Prokopovicz, gefianĉiĝis en Bucuresiti (Rumanio). [1]

EDZIĜO. S-o Adalberio Babos, prof. en Ludošul-de-Mureŝ (Transilvanio, Rumanio), kaj f-lino Irenke Keller el Modoš (Banato, Rumanio), geedziĝis la 15 jan. [1]

EDZIĜO. S-o Obrazcov Vadim V., prezidanto de Kazana soc. esp. kaj f-lino Sneqireva A. A. geedziĝis la 25 jan. 1924 en Kazan (Rusujo). [1]

**Korespondoj kaj Interŝanĝo.**

18-jara f-lino deziras korespondi per il. pk. kaj l. El. Iv. Ĥatov, Gagarsinskij n-o 1, kv. 12, Leningrad, Rusujo. [2]

Kiu volas aĉeti rusajn librojn, bonvolu skribi al s-o A. Saharov, Gagarsinskij n-o 1, kv. 12, Leningrad, Rusujo. Esp., ruse, angle, itale, germane, france. [2]

Ges-anoj atentu! Mi deziras interŝanĝadi naciajn ilustraĵojn ne satirajn ĵurnalojn kaj ankaŭ eltranĉaĵojn el diversaj ĵurnaloj. Mi sendas rusajn kaj petas vialandajn. Ĉiam respondos. L. Sulpovar, Stuleŝnikov per n-o 7, kv. 9., Moskva, Rusujo. [2]

Se vi volas havi ĉiaman kaj akuratan korespondadon, skribu al s-o Veneslavio Vernikovskij, Bolotnaja ul. n-o 10, komn. 14, Moskva, Rusujo. [2]

Kiu sendos al mi unu kvanton da poŝmarkoj de sia lando, ricevos tuj la saman kvanton da poŝmarkoj polaj kaj aliaj. Kontraŭ diversaj mi sendos diversajn. Mi petas sendaĵojn rekomenditajn. Pomsnik M. Grodzki, Tuszewo, poŝto Grudziadz, Polujo. [2]

Rusa radiotelegrafisto deziras interŝanĝadi leterojn kun samprofesioj el ĉiuj landoj pri senfadenaj telegrafaj kaj telefonaĵoj. Mi tre petas sendi fotoĝrafiojn de viaj stacioj. Adreso: M. Volberg, Razgulaj Bolsoj Demidovski 10, kv. 5, Moskva, Rusujo. [2]

S-o Arne Rundberg, Källtorp, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj prefere kun eksterŝtatanaj. [2]

S-o Anders Lindmann, Holmgatan 4, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, prefere kun junulinoj. [2]

Kiu deziras korespondi kun mi pri diversaj temoj? Mi atendas respondojn el ĉiu provinco de Esperanto. Fraŭlo Hasse Elftsen V., Hargsvägen 20, Mjölby, Svedujo. [2]

Juna sveda fraŭlo, Charles Peterson, Box 54, Mjölby, Svedujo, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Tre volonte kun fraŭlinoj. Mi volas interŝanĝi esp. gazetojn kaj il. pk (Afranku bil.) Ĉiuj eksterŝtatanaj ricevos belan il. kajeron el mia lando. Mi estas I.O.G.T.-ano kaj mi tre volonte volus korespondi kun tiaj samideanoj. [2]

S-o R. H. P. Jansen, Da Costastraat 19, Hago, Nederl. lando, deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi respondas kiel eble plej baldaŭ. [2]

Por 1 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas la diversajn germanajn pm. (miliona valoro) kaj 5 diversajn litovajn Memelmarkojn. Fritz Zyleit, Grabnik ĉe Lyck (Ostpr.), Germanujo. [2]

S-o Stefano Pedrazzini, del. UEA, Locarno, Svisujo, interŝanĝas pk., gazetojn, esp. librojn kontraŭ poŝmarkoj de ĉiuj landoj. [1]

Fotografisto interŝanĝas pm., aŭ sendas belan foton de historiaj kasteloj kaj de la milito kontraŭ pm. Li sin rekomendas por ĉiuj fotogr. laboro. Mia fratino interŝanĝas il. pk. S-o kaj f-lino Lentge, Angers, Francujo, 10, rue Ponts Cé. [1]

Poŝtmarkoj! 55 diversaj germanaj provizoraĵoj (5 mil-5 milonoj), neuzitaj kontraŭ antaŭa sendo de 1.50 dolaroj aŭ poŝtmarkoj de via lando laŭ sama valoro. Mi ne sendas anue. Herm. Albrecht, Köln, Germanujo, Am Zuckerberg 8. [1]

Interŝanĝo de il. pk., il. gazetoj, pm., (ankaŭ pli grandaj kvantoj), korespondado pri diversaj temoj, kun eksterlandanoj deziras s-o Wilh. Niebsch, Oels (Silezio) Kronprinzener-Str. 2, Germanujo. [1]

F-lino H. de V. ver, Abrikoostraat 58, Utrecht, Nederlando, deziras korespondi per il. pk. kun interesaj vidindaĵoj. [1]

Fraŭlo Adalberto Latko, en Brašov, Rumanujo Targul Roselor n-o 15, deziras korespondi per il. pk. kun ĉiuj landoj, precipe Ekster-Eŭropo. [1]

S-o Lucacs Ajan, Cluj, Rumanujo, Calea Victoriei 89, sendas rumanajn pm. kontraŭ alilandaj. [1]

S-o J. Purnr, Hradec Kralové, Ĉeĥosl., interŝanĝas pm. Respondas ĉiam. Aĉetas uzitajn pm. per 100 ekz.; tiurilate petas nur proponojn kun specimenoj. [1]

S-o Hermann Kühn, (22-jara), instrulisto, Ottmachau (Schles) Germ., deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Respondas ĉiam. [1]

F-lino Etele Kiss kaj Ladislao Kiss, deziras korespondi, interŝanĝi pm. kun gesamideanoj. Adreso: Pecs, Feisg-Malom-u. 21, Hung. [1]

Likvoristo deziras korespondi kun samprofesianoj, ankaŭ kun aliaj samideanoj tutmonde. Adreso: Franjo Klakočar, Zrinjski trg. 15, Karlovec, lugoslavio. [1]

S-o Yrjö Rundberg, Hiekkie, Vuorikatu 1, Helsinko, Finlando, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. [1]

S-o Stefano Pedrazzini, del. UEA, Locarno, Svisujo, interŝanĝas pk., gazetojn, esp. librojn kontraŭ poŝtmarkoj de ĉiuj landoj. [1]

Korespondemuloj! Germana junulo deziras interŝanĝi kun gejunuloj de eksterlando, precipe kun inoj. August Spürkel, Horrem b. Köln, Hindenburgstr. 22, Germ. [1]